

ŜANĜO DE KUNVENEJO

Atentu ke denove la Irlanda Centro estos fermita dum 3 vendredoj en la sekva periodo. La komitato aranĝis anstataŭan kunvenejon por jenaj vesperoj:

11 oktobro, 1 novembro: Hotelo Ibis, Drummond St/Cardlington St. Metro: Euston, Euston Square, Warren St.



Cetere estas proksime al la iama kunvenejo en Drummond St.

25 oktobro: Hinda YMCA, 41 Fitzroy Square, W1
Metro: Warren St (5 min piede), Gt Portland St (7 min)

Kluba Programo:**septembro:**

- 6 Klubanoj: *Kongresaj Raportoj*
- 13 Matt Peperell: *Briĝo (kartludo)* (1800h: konsilantaro)
- 20 Socia Vespero
- 27 John Wells: *Lingva Seminario*

oktobro:

- 4 Ludvespero (gvidata de Mikaelo Sims)
- 11 (*En Hotelo Ibis*) Socia Vespero
- 18 Heleno Fantom: *El la Maniko de nia Librobretaro*
- 25 (*En Hinda YMCA*) John Wells: *Lingva Seminario*

novembro:

- 1 (*En Hotelo Ibis*) Socia Vespero



(Vidu 13a septembro). *La sekva ĉerpiĝis el Vikipedio:*

Briĝo estas kartludo por kvar ludantoj, dividitaj en duopojn, nomatajn ankaŭ *flankoj* (duopo batalas kontraŭ duopo). La ludo konsistas el sinsekvaj *disdonoj*, ĉiu el kiuj havas du fazojn: la aŭkcion kaj la kartludadon.

La briĝo ligiĝas al inicianto **Culbertson**. Tiu ĉi artikolo(*) priskribas la klasikan robrobriĝon, kiun oni kutime ludas inter amikoj. Ekzistas ankaŭ kelkaj aliaj variantoj de la ludo, la plej gravaj estas turnirbriĝo kaj Ĉikago-briĝo (la diferencoj koncernas precipe la poentokalkuladon).

(*) *la font-artikolo el Vikipedio*

Esperanta Kalendaro:

20 - 23 septembro: Internacia Amikeca Renkontiĝo, Aylesford, Kent. Informilon/aliĝilon petu de Anica Page, anica_page@btinternet.com, aŭ 01908 564004

Aliaj anoncoj:

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 19a oktobro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:

18:00 - 19:15 *beginners' class*

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,
50-52 Camden Square, NW1 9XB
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo London Overground: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj: Bonrevenon al ĉiuj feriintoj, de ties somervojagxoj! LEK atendas viajn rakontojn, fotojn kaj memorigilojn. (Priparolante tion, ne forgesu partopreni la kunvenon – t.e. 'Kongresaj Raportoj' – je la 6a de septembro.)



Iom samteme, ni agnosku, ke lastatempe mankis sufiĉe da konkretaj programeroj. Ni ne hontu pri tio, sed ni plibonigu la situacion. Tia kunlaboro povas esti kaj glata kaj facila – ĉar ekzistas sufiĉe da LEKanoj kun sufiĉe da intereso, vivoj kaj hobiaj. Kiel vi scias, oni ne nepre prelegu pri Esperanto – nur per ĝi. Tiel do ebligas sennombrajn prezentojn en senlimaj formoj. Aŭtobiografietoj, ŝatokup-raportoj, lumbild-serioj, laŭtlegado de propraj verketoj, diskutigoj pri aktualaĵoj, recenzoj, eĉ proponoj pri LEK mem – ĉiaj estus bonvenaj. Akceptu la defion, ekzercu la lingvon kaj ĝuu la sperton! Eĉ se vi jam faris prelegon, faru denove. Ju pli da persona vigleco en tiaj aferoj, des pli vigla via Klubo.

Ankaŭ varbu amikojn por vendredaj vizitoj, almenaŭ por montri al duon-interesato, ke Esperanto funkcias kaj havas adeptojn. Kompreneble elektu vendredon, kies ĉef-programero probable allogus pli ol minimuman aŭskultantaron. La efiko ĉe via amiko do probable estus pli ol minimuma – kaj pozitive spronus al eklernado, ĉu per interreto ĉu per klasĉambro. Se la amiko ne sentas tiom da konvinko, la sperto eble spronus al menciado al amikoj de la amiko – pri la ekzisto de Esperantistoj en la nuna mondo, inkluzive en Londono. Kiel oni diras: "Ajna publico estas bona publico."

Post vizito al Esperanto-Klubo, precipe al la nia, preskaŭ iu ajn certe agnoskus, ke la Internacio Lingvo estas parolebla, parolata kaj jam kreis komunumon el diversaj individuoj. Invitu, do, invitu! Kaj helpu unu la alian, per memflankaj proponoj pri la programo. Tiel ni ĉiuj gajnos multon.

Sincere,

David Thornell

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;
Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo
Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Michael Sims, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).
Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek-sekretario@gmail.com;
Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk,
Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP
Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.